

ISSN: 1056-0297

Usona **Esperantisto**★

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin • Vol 47, N° 6 (2008/6)



Skolta sukceso! (vidu paĝon 4)

Ankaŭ ĉi-numere: *Esperanto kiel virtuala realo* • Membriga kampanjo • Suplemento al la Membrolisto • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial deadline for the upcoming issue:*

la 25-a de Januaro 2009

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla lingvo. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j) kaj la loko kaj dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Director, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT

Aliaj estraranoj • Other board members:

Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS,

Mar CARDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW,

Lusi HARMON, Ros HARUO, Christopher ZERVIC

Rigardi malantaŭen... kaj antaŭen

Kiel rapide la tempo fuĝas! Baldaŭ finiĝos 2008, mia unua jaro redaktante nian bultenon, la *Usona Esperantisto*. La sperto estis kaj honoro kaj instruo.

Mi elkore dankas vin ĉiujn pro la belaj kontribuoj kaj afablaj vortoj, kiujn vi sendis. (Kaj mi pardonpetas, ke mi ne povis aperigi ĉiujn kontribuojn. Tamen kelkaj restas rezerve, por venontjara uzo!)

Sojle de la nova jarŝanĝo, mi denove pripensas eblajn ŝanĝojn por freŝigi la bultenon, kaj enhance kaj formate. Kion vi volus aldoni aŭ forigi? Ĉu vi havas ideojn pri novaj rubrikaj? Jen kelkaj ebloj, kiujn mi nun pripensas:

- *Debato:* bone elpensitaj argumentoj, pro kaj kontraŭ, rilate al aktuala temo. Ekzemple: "Ĉu oni enmiksi Esperanton en politikajn aferojn?"
- *La ĉielo ĉi-monate:* aferoj astronomiaj. Kiuj astroj estos vidindaj dum la venonta monato por ĉielo-rigardantoj en la norda duonsfero?
- *Facila Esperanto:* ĉiunumera legaĵo por komencantoj en simpla lingvaĵo.
- *Renkonti viajn samlandanojn:* intervjuoj kun interesaj usonaj esperantistoj, kiujn vi eble ankoraŭ ne konas.

Kion vi opinias? Kaj ĉu vi havas tempon kaj intereson kontribui novan rubrikon tri- aŭ ses-foje ĉiujare? Bonvolu sendi al mi viajn proponojn!



Hoss FIROOZANIA
senpacience atendas viajn kontribuojn: ĉu per reto, per poŝto... aŭ eĉ per amikema kolombo. (Sed preferu per reto!)

bulteno@esperanto-usa.org

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the membership list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Projekto Gutenberg atingas mejloŝtonon

Lastatempe aperis reta eldono de "Vivo de Zamenhof," la 51-a libro en Esperanto libere havebla per Projekto Gutenberg, la unua kaj ĉefa interreta eldonejo de liberaj elektronikaj libroj.

La Esperanto-libraro tie jam ŝvelas de nur ses libroj en 2005 ĝis 51 en 2008 pro la diligenta laboro de nur kelkaj volontuloj.

Ĉiuj libroj en Projekto Gutenberg estas libere haveblaj por legado, represado kaj ĝuado. Aktuale ĝi ofertas verkojn en 56 lingvoj; kun la aldono de ĝia 51-a libro, la Esperanto-libraro fariĝas la dekdua laŭ grandeco.

Se vi volas helpi per skanado de malnovaj libroj, provlegado de enskanitaj tekstoj, ktp, aŭ se vi volas scii pli pri Projekto Gutenberg, bonvolu kontakti Robert L. READ, ĉe <read@robertlread.net>.

La Esperanto-libraro haveblas ĉe:

[http://gutenberg.org/wiki/Esperanto_\(Bookshelf\)](http://gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf))

El la arĥivo de la Centra Oficejo...

Lastatempe d-ro E. James LIEBERMAN afable donis al la CO la jenan leteron, kiu aperis antaŭ jardekoj en № 1977/4-5 de la *ELNA Newsletter*.



THE WHITE HOUSE

WASHINGTON

July 22, 1977

I send warmest greetings to the delegates at this Twenty-Fifth Annual Conference of the Esperanto League for North America.

Improved communication among individuals and nations is one of the key ways of building greater international understanding and goodwill.

I applaud your efforts to contribute to this goal and wish you a highly productive and successful session.

Membership renewal campaign

Don't miss out on the benefits and resources you receive by your membership in E-USA—and don't miss out on your chance to help promote Esperanto in the USA.

You'll soon receive your renewal letter in the mail.

Please don't wait to renew your membership in Esperanto-USA for 2009. Complete the form and return it before the end of the year.

Membriga kampanjo efektiviĝas

Ne perdu la avantaĝojn kaj servojn, kiujn vi ricevas kiel ano de E-USA—kaj ne perdu vian ŝancon kontribui al la Esperanto-movado en Usono.

Baldaŭ vi ricevos vian realiĝo-leteron perpoŝte. Bonvolu ne prokrasti: realiĝu al Esperanto-USA por 2009. Kompletigu la aliĝilon kaj resendu ĝin antaŭ la fino de la jaro.

Lokaj novaĵoj de ĉirkaŭ Usono

Esperantistoj en Masaĉuseco manifestacias por egalaj rajtoj

Raportis Steve BREWER

La 15-an de Novembro, nacian manifestacion oni organizis por protesti la sukceson de balotpropono № 8 en Kalifornio, kiu malpermesas gej-edziĝon. Nia loka Esperanto-grupo decidis solidare partopreni por kontraŭstari la forprenon de rajtoj de minoritata grupo da homoj. Unu el niaj membroj estas transseksa samsek-samulino kaj ni ĝojis stari por ŝi—sed ankaŭ por ni mem.

Ni sentis fortan bezonon kontraŭstari la maljustecon de la nova leĝo. Ni faris kelkajn ŝildojn en Esperanto kaj portis ilin al la manifestacio.

La tago komenciĝis pluve. Dum ni veturis al la manifestacio, mi iom timis ĉar ekpluvegis kaj eĉ fulmis. Ni renkontiĝis ĉe meksika restoracio kaj tagmanĝis. Dume, la pluvo ĉesis. Bonŝance dum la tuta manifestacio, nur pluvetis.

Venis proksimume dumil homoj. Ni kune staris kun la aliaj kaj montris niajn ŝildojn. Estis kelkaj afablaj demandoj pri niaj ŝildoj kaj ni feliĉe klarigis al oni kio estas Esperanto. Ni aŭskultis paroladojn, kune kantis kun la grupo Koleregaj Avinoj (angle: *The Raging Grannies*), kaj multe ĝuis la aktivan, pozitivan etoson. Mi faris multajn fotojn.

Post du horoj, mi iris hejmen. Estis nur eta paŝo por ni, sed okazis similaj manifestacioj tra tuta Usono. Kontrolu la televidajn novaĵojn ĉar eble vi vidis niajn ŝildojn ĉe via televidilo!

Informado kaj dialogo ĉe librofoiro en Miami

Raportis Neil BLONSTEIN



La 14-an de Novembro mi kaptis okazon neformale partopreni en la Librofoiro de Miami.

Inter la partoprenantoj estis grandaj religiaj, politikaj, eldonistaj organizoj. (Iuj mi supozas havas aŭ havos kontaktojn kun UNO). Estas utile



mencii ke duono de la homoj en Miami parolas ĉefe hispane kaj multaj brazilanoj estis surloke. Miaj scioj de tiuj lingvoj estis ofte bezonataj.

Mi speciale devas danki la lokan spiritistan movadon de suda Florido, kiu permesis al mi konservi informilojn ĉe ilia budo. Ne tro surprize, unu el la 5 partoprenantaj spiritistoj, Roberto CABRAZ, iam studis Esperanton en Fortaleza, Brazilo, kaj rekomendegis lokan kunlaboron (ekz. prelegon pri Esperanto ĉe loka spirita domo).

Mi povis dialogi kun PEN Internacia (la junulino tie ja renkontis aliajn PEN-

aktivistojn kiuj subtenas Esperanton), *Social Workers Party* (Socialista Laborista Partio), *Ahmadiyya* (Islama) Movado, *Logosophy-Movado* (Magdalena, el Brazilo, klarigis ke kelkaj el ĝiaj eldonaĵoj ja estas en Esperanto), Asocio de Aŭtoroj de Florido, eldonejo *Nation Book* (eldonas ankaŭ la gazeton *The Nation*)—ili klarigis ke amika eldonejo, *Bloomsbury* planas eldoni libron pri la historio de Esperanto—kaj Nacia Publika Radio. Samtempe mi informiĝis pri tiuj movadoj/organizoj kaj mi povis paroli dum pluraj minutoj pri Esperanto disdonante 4-paĝajn informilojn. Mi ricevis plurajn kontakt-adresojn.



New York Scout interprets Esperanto

Reported by Thomas ALEXANDER

Bear cub scout Jonah Alexander has received an Interpreter Strip for Esperanto. This is an official BSA insignia which indicates that the scout can interpret the language in question, should the need arise. To receive the insignia, Jonah had to have a five minute conversation in Esperanto, interpret a two-minute address, write a letter, and show that he can read a short book in Esperanto. Both he and his father (Thomas Alexander) received the Interpreter Strip in the Spring of 2008, while Jonah was a Wolf Cub Scout with pack 321 in Greece, NY. ★

Forpasoj

David MCNETT

La 23-an de Oktobro forpasis David MCNETT en Olympia, Vaŝingtonio. Li estis 86-jaraĝa. Laŭ informo de Ellen EDDY:

“Oni neniam estas tro aĝa por lerni Esperanton. David MCNETT, ano de nia loka grupeto kiu pruvis tion kiam li ricevis sian diplomon por la perpoŝta kursaro en 2002 je la aĝo de 79. Li amis lingvojn kaj studis 17 dum sia vivo. Li estis ege entuziasma pri Esperanto kaj propagandis ĝin konstante kiam li helpis studentojn ĉe la lokaj gimnazio kaj mezlernejo kie li volontulis dum pli ol 20 jaroj. Li estis ankaŭ kunfondinto de la loka societo Audubon. Dave aldonis spicon al nia grupo per siaj observoj de vivo kaj sia humuro. Per helpo de diversaj membroj, li fidele partoprenis klubaranĝojn eĉ kiam lia sano malfortigis lin.” Cetere, Ellen sendis al ni la jenan anglalingvan artikoleon, kiun ŝi verkis pri lia memoriga servo:

Never Underestimate Your Efforts for Esperanto

Over 100 people gathered November 8th to honor a man who was a much-

loved member of the community, especially for his efforts with children. Dave McNett, died at the age of 86 in Olympia, Washington. But his spirit and his effect on all the lives he touched will live on as became apparent as attendees shared their heart felt experiences.

Family members remembered the uncle, brother. School teachers remembered the volunteer who had so much knowledge of languages and birds. Esperanto was mentioned by the first teacher to speak, since Dave constantly tried to interest teachers and students to learn Esperanto.

There was even a show of hands of all those who remembered his efforts for Esperanto. At least 20 people raised their hands.

Midway through the remembrances, I shared our local group's experiences with Dave. I was totally surprised when I stated that I was Dave's Esperanto teacher (he had completed the free postal course) and the audience applauded! Afterwards one school administrator shook my hand.

The positive attitude toward Esperanto seemed to permeate the room. This was a striking reminder that all our small efforts for Esperanto can really bear fruit.

Ralph LEWIN

La 30-an de Novembro forpasis Ralph LEWIN en La-Jolla, Kalifornio pro kancero de ezofago. Li estis 87-jaraĝa.

Konata kiel “la patro de la genetiko de verdaj algoj,” d-ro Lewin estis sciencisto, profesoro, poeto kaj UEA-delegito por La-Jolla.

Li laboris 48 jarojn ĉe la instituto de oceanologio *Scripps* ĉe la Universitato de Kalifornio ĉe San-Diego, kaj li estis ĉefa aŭtoritato en pluraj fakoj de marbiologio. Li estis aktiva scienca esploristo kiu prelegis tra kaj Usono kaj la mondo. Li helpis organizi kaj instrui kursojn pri mar-mikrobiologio kaj algo por UNESKO en Finnlando, Singapuro kaj Ĉinujo. Li verkis pli ol 250 sciencajn artikolojn, kaj li estis konata pro siaj poemoj.

Laŭ informo de d-ro D. K. JORDAN, “ĝis la lastaj horoj li restis lerta kaj sendolora, kvankam debilega. Je la peto kaj de li kaj de lia edzino Lanna, oni ne planas funebran ceremonion. Kondolencajn esprimojn oni sendu al d-ino Lanna Cheng LEWIN, 8481 Paseo del Ocaso, La Jolla, CA 92037-3024.”

Leteroj

Memoroj pri Don HOUPE

(Keneĉjo GOLDBERGO plusendis la jenan leteron por ke mi dividu ĝin kun vi. Li originale verkis ĝin por sam-NASKano Kristen MCCARTNEY, kiu studis en Norda Karolino kun d-ro Houpe. — Red.)

Kara Kristen,

NASK-anoj 2008 ni ambaŭ estas. Dum NASK 2005 Don kaj mi iĝis parencaj.

Mi konfesas, ke mi ne certis antaŭ vin mi renkontis pri la prononco de la familia nomo de tiu ĉi grande humila, komfortige afabla homo, ĉiam profunde ŝatata, tutanime amata en mensoj, koroj, sentas mi, niaj.

Dum iu granda festo vi ĝisdatigis min pri la ratoj hejmbestaj, tiel amataj de Don, dek ses entute(!)

Don kaj mi intimiĝis manĝante kune, ronde, ofte kun klasano Vilĉjo (nuna direktoro de la C.O.). Kiam venis tre varmaj vermontaj tagoj, Don kaj mi, kun instruisto nia, Paŭlo, trovis etan, rondan tablon

en la ombro de la manĝejo. Ĉi tieajn iliajn konversaciajn mirindaĵojn tutanime mi ĝuis.

Antaŭ vi, Kristen, kaj mi renkontis unu la alian, sciis mi, ke Don, krom la zamenhofa lingvo, ĝue instruas nur la rusan—modesta homo!

Ja sciigis min Don, ke el via gimnazia biblioteko ĉio esperanta estas pruntebla pere de iu ajn publika biblioteko!

Mi skribu pri amo kaj zorgo.

Ofte parolis zorge Don pri sia rato amata, kiu restis hejme kuŝanta en ĉemizo komfortige odoranta de sia amanto. Sentis Don, ke ĝi sopiras lin.

Mi rakontu, ke unu monaton post tiu NASK telefonis al mi Don! Sciigis li min, ke unue li telefonis al alia klasano nia, Filipino, nia tiam nova prezidanto, kaj poste al mi.

Imagu!

Ni bele parolis dum du dekoj da minutoj. Memoras mi, ke ni interkonsentis ke ni preferas la nomon Don pli ol la konatan—mi menciu, ke gajnis Don unuan premion ĉe Belartaj Konkursoj de UEA por sia profesie produktita konkur-

saĵo en la branĉo Filmo, titolita—D-ro Ratamanto.

Kiam mi ekkomprenis, ke vi estas studinto de Don, d-ro Houpe, mi ankaŭ ekkomprenis tiel kompetentan, trankvilan, afablan lingvan elegantecon vian.

Amiko via,

—Keneĉjo GOLDBERGO

Gratulojn el Tanzanio

Mi gratulas vin okaze de la baloto en via lando.

Mi esperas ke la demokratio en via lando kaptas grandan rolon en kiu oni elektis novan prezidanton kiu havas Afrik-devenan koloron, kaj ke la novelektita prezidanto gvidos vian landon al plifortiĝo kun pli bona ekonomio kaj ke li kiel eble plej bone forigos la malamikecon inter Usono kaj arabaj landoj, samtempe forigos la armeojn en Irako, kaj se eblas, vidos eblon ĉesigi la militon en Afgano.

Mi deziras pacon, sekurecon kaj fortan ekonomion al via lando kaj al la tuta mondo.

—Mramba Simba, Tanzanio

Esperanto kiel virtuala realo

En Februaro kelkaj homoj dise en la mondo ricevis neatenditan pakadon. Enesitis kelkaj malnovaj bildkartoj, bela afiŝo pri la Olimpikoj de 1920, kaj fadenaro. Kelkaj homoj tuj fotis la objektojn, afiŝis la bildojn en la reto, kaj komencis interdiskuti pri la signifo de la aĵoj.

La objektoj starigis interesajn demandojn: Kie estis tiuj Olimpikoj? Kio alia okazis tiun jaron? Multaj homoj ne sciis kion fari, se ili ricevus tian pakadon.

Sed la ricevintoj estas homoj, kiuj partoprenas ludojn pri “alternativa realo,” kaj jam scias, ke tiuj ĉi objektoj estas “kunika truo”, kondukanta al mondo en kiu mirindaj aferoj povas okazi. En tiu mondo, ili estas ne nur studentoj aŭ bibliotekistoj, sed homoj, kiuj devas savi la mondon.

Kelkajn tagojn poste oni eltrovis blagon de virino kiu nomis sin “Ariadne.” Ŝi vekigis en mezo de maizo-kampo kaj estis perdinta la memoron. La nura sekvebla indiko estis, ke sur ŝia brako estis la vortoj “Trovu la ringon perditan,” en Esperanto. Poste oni konstatis, ke kvin aliaj homoj vekigis en similaj cirkonstancoj, dise en la mondo. Ariadne malkovris ke la profesoro Eli HUNT scias ion pri ili, kaj kiam ŝi alfrontis lin, li klarigis ke temas pri perditaj olimpika sporto.

Li plue donis sufiĉajn sciigojn por ke oni eltrovu sekretan retan komputilon. Tiu montris bildon de turniĝanta tergloblo farita el divers-koloraj punktoj. Post esploro, montriĝis ke oni povas ricevi per la komputilo sciigojn pri kaŝitaj ĉapitroj de libro, skribita en Esperanto.


Kaj tio ankoraŭ estis nur la komenco de la ludo. En la fino, oni devis kuri tra labirintoj, trovi kaj “ŝteli” statuojn kaŝitajn en interesaj lokoj tra la mondo (interalie la Esperanto-Klubo de Bonaero), kaj organizi ritman dancon sinkronizitan inter la partoprenantoj de la solena fermo de la olimpikaj ludoj kaj homoj ĉe la Granda Muro en Ĉinujo.

La ludo, kreita de la firmao *Avant Games*, kun financa subteno de la firmao *McDonald's* kaj de la Internacia Olimpika Komitato, allogis partoprenon de 2,5 milionoj da homoj tra la mondo. Multaj el tiuj nur ete partoprenis, dum aliaj laboris dum horoj por solvi la enigmojn, traduki la ĉapitrojn en multajn lingvojn, superi la defiojn, kaj eĉ vojaĝi kaj kunlabori en la vera mondo. (Vidu la retejon de la ludo: <<http://thelostring.com>>.)

Mi unue interesiĝis pri la ludo ĉar temis pri Esperanto. Mi aŭdis jam kelkfoje

pri tiuj ludoj de alternativa realo. Ofte ili ricevas monan subtenon de grandaj firmaoj, kiuj uzas ilin por fari enmerkatingon direktitan al junuloj. Ĝis nun ili estis plejparte usonaj aŭ almenaŭ anglalingvaj fenomenoj. Kelkaj fariĝis vaste konataj en la reta komunumo kaj ankaŭ estis la temoj de libroj de famaj aŭtoroj.

William GIBSON en la libro *Pattern Recognition* (“Formo-rekono”) priskribas ludon de alternativa realo kaj ties komunumojn. Charlie STROSS en *Halting State* (“Haltostato”) priskribas, kiel tiaj ludoj povas esti uzataj de registaroj aŭ grupoj por atingi kaŝitajn celojn. Cory DOCTOROW en sia elstara libro *Little Brother* (“Frateto”) montras, kiel ili povas esti uzataj por organizi kontraŭstaron al maljusta registaro.



Unu paĝo el la esperantlingva “kodekso”, kiun trovis ludintoj dum la ringo-ludo.

La reton oni pli kaj pli multe uzas por organizi. Por interŝanĝi ideojn kaj “me-meojn,” ĝi estis jam tre utila kaj eĉ nepra. Bedaŭrinde tamen oni ankoraŭ ĝis nun ne eltrovis manieron uzi la reton por atingi veran ŝanĝon aŭ agadon en la reala mondo. Estas facile akiri milojn da subskribintoj ĉe iu reta plendo aŭ manifesto. Malfacile estas montri ke tia agado iam kaŭzas veran politikan aŭ socian ŝanĝon. La ludoj de alternativa realo situas je ambaŭ flankoj de tiuj ĉi kampoj, do oni nun studas ilin por ekscii, ĉu ili povas esti modelo pri kiel ekuzi la reton por krei efikan agadon en la reala mondo.



Steven D. BREWER

Steve estas profesoro de la Universitato de Masaĉuseco kaj li administras la retejon de Esperanto-USA. Li loĝas en Amherst, Masaĉuseco.
sbrewer@bio.umass.edu

Jane MCGONIGAL, la kreinto de la firmao *Avant Games*, verŝajne estas tiu, kiu plej bone konas tiujn ĉi ludojn. Ŝia ofta diraĵo estas, ke la efektiva realo estas rompita—kial do lud-fasionistoj ne povu plibonigi ĝin? Ludoj estas bonaj, ĉar ili produktas feliĉon en homoj. La reala mondo estas ofte malfeliĉa—multaj homoj ne havas bonan memsenton rilate siajn atingojn, postenojn kaj ĉiutagan laboron. Tiaj ludoj estas allogaj precipe ĉar ili proponas la ŝancon fariĝi parto de io grava kaj pli granda. Eblas ke oni faru pli interesan laboron kaj ke tiu laboro estu grava al komunumo de sampensantaj homoj.

Dum siaj jaroj de ludfasonado, McGonigal konstatis ke kelkaj kapablo necesas por sukcesi je tiuj ĉi ludoj. Ŝi nomas ilin “superaj kunlabor-kapabloj por ludoj de alternativa realo,” sed eble ili estas gravaj ankaŭ ĝenerale por ekuzi la reton por atingi celojn en la reala mondo. McGonigal kreis novajn anglajn vortojn por tiuj ĉi kapabloj kaj, de ili, mi kreis similsignifajn kunmetaĵojn en Esperanto.

Aregigivo: Kapablo atingi kaj allogi multajn homojn aktivigi pri io. Temas pri la scio kiel atingi multajn homojn en simpla, klara kaj instiga maniero. Temas pri la kapablo uzi teknikajn rimedojn kaj ĝuste enmerkatingi mesaĝon al diversaj specoj da homoj, certigi ke tiuj aŭdas la ĝustan mesaĝon per la ĝusta kanalo.

Kunaga radaro: La kapablo ekscii, kiu (aŭ kiaj homoj) taŭgas por iu (aŭ ia) laboro. Kelkaj homoj taŭgas por trakti la detalojn, aliaj por la grandskala bildo, aliaj por trakti homojn, aliaj laboru nur per komputilo, ktp. Tiu ĉi kapablo rilatas al homo, kiu povas helpi ke aliaj trovu la ĝustajn kaj taŭgajn taskojn por si mem.

Pinga kvociento: La kapablo respondi rapide al demandoj kaj kontaktoj. Kelkaj homoj respondas nur vespere aŭ semajnfine, dum aliaj ŝajnas esti ĉiam ĉe la reto—poŝtilo aŭ tujmesaĝilo. (La vorto “pingo” devenas de komputila programo kiu prove kontaktas aliajn komputilojn sur la reto kaj mezuras la tempon ĝis la respondo.)

Influvo: La kapablo scii kiel persvadi kaj konvinki diversajn specojn de homoj pri io. Temas pri kapablo klarigi aferojn el diversaj vidpunktoj, tre simple aŭ pli profunde, depende de la ecoj de la aŭskultanto, ekzemple intereso, socia klaso, etna grupo, scio, edukado, ktp.

Multkapitalado: La kapablo ekuzi la multajn diversajn kapitalojn kiujn oni havas por la plej gravaj efektoj. Kapitaloj povas esti mono, sed ankaŭ rimedoj homaj, komunumaj, naturaj, retaj, ktp.

Provduktado: La kapablo ellabori kaj dissemi ion kiel eble plej rapide ĝis uzebleco. Oni ellasas la prov-ekzemplerojn de io rapide por ke aliaj provu dum oni plibonigas ĝin. Tiu ĉi ideo devenas de ofta diraĵo pri la disvolviĝado de programaro: ellasu frue kaj ofte.

Malferma aŭtoreco: La kapablo facile partopreni (kaj lasi ke ankaŭ aliaj partoprenu) dum la disvolviĝado de rimedoj, ĉu tekstoj, planoj, programoj, ktp. Oni devas deteni sin por ne regi ĉion mem aŭ finlabori ion sen partopreno de la komunumo.

Skal-saltivo: La kapablo memori la plej grandskalan bildon eĉ dum oni rigardas ties multajn erojn aŭ estas en la mezo de multaj taskoj. La kapablo pripensi la arbaron eĉ dum oni rigardas la arbojn unuope.

Antaŭvidivo: La kapablo prognozi kaj esti preta por respondi al surprizaj rezultoj aŭ fenomenoj kiuj aperas neatendite. Ĝi estas speco de mensa fleksebleco kaj la kapablo ŝanĝi sian vidpunkton kiam necesas.



Rondo de esperantistoj interparolas en *Esperanto-Lando*, unu regiono en la interreta Dua Vivo.

Signaltraktado: La kapablo trakti multajn mesaĝojn kaj informfluojn samtempe, rekoni tiujn aferojn kiuj estas plej gravaj kaj kiuj bagatelaj, kaj eltiri la signifajn kiu estas necesa por progresi.

Necesas rekoni, ke multaj el ni jam estas en ludo de alternativa realo, kiu nomiĝas “Esperantujo” (aŭ, por kelkaj, “Esperantio”). Ni elektis respondi al la voko lerni internacian lingvon kaj varbi aliajn por solvi la problemon de monda nekomunikado. Ni traktas defiojn kaj solvas enigmojn pri lingvoj kaj kulturoj; pri registaroj kaj homgrupoj; pri kiel organiziĝi por superi la defiojn. Ni ekuzu ĉion, kion ni povas lerni pri ludoj de alternativa realo por plibonigi la efikon de nia agado. Ni bezonas homojn kiuj havas

aregigivon, kunagan radaron, kaj la ceterajn kunlaborajn superkapablojn.

Estas tamen iom maltrankvilige, ke en la nuna kulturo estas ĉiam malpli da homoj kiuj agas laŭ ia forta kredo, ke eblas krei pli bonan mondon, kaj ĉiam pli da homoj, kiuj laboras nur por vivteni sin kaj uzas ajnan pluan tempon por eskapi el malfeliĉa vivo en alternativajn realojn. Aŭ eble mi simple rigardas la pasintecon tra rozkoloraj okulvitroj?

Eblas atingi homojn en ties alternativaj realoj, ĉu en Esperantujo, ĉu en “Dua Vivo” aŭ aliloke, sed ne estas certe, ke tiaj homoj iam celos uzi Esperanton en sia reala mondo. Ĝis Esperanto fariĝos io en la reala mondo, por la plej multaj ĝi restos nur flankokupo. ★

Esperanto-Vojaĝoj

Kongreso de Esperanto-USA

St. Louis, MO—22–25 Majo

Aliĝilo baldaŭ haveblas—pasporto ne bezonata ĉi-jare por nia landa kongreso.

61-a IFEF-Kongreso

Triesto—23–29 Majo

(Postkongreso: 30 Majo–1 Junio)

Triesto atendas vin! Maro, montoj, milda temperaturo kaj... granda festado okaze de la 100-jariĝo de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Fakaj (kaj ne-fakaj) prelegoj, konatiĝo kun loka kulturo, ekskursoj province kaj regione en eksterordinara esperanta etoso: elkoran bonvenon al ĉiuj esperantistoj: kaj fervojistoj kaj nefervojistaj. Rete: <testudo.ts@gmail.com>

Poŝte: Triesta Esperanto-Asocio, CP 601 Trieste Centro, IT-34132 Trieste, ITALY. TTT: <<http://www.ifef.net>>.

Nord-Amerika Somera Kursaro

San Diego, CA—29 Junio–17 Julio

Tri semajnoj en Esperantujo ĉe la fama Universitato de Kalifornio. Kontakti s-inon Ellen EDDY <eddyellen@aol.com> aŭ vizitu la TTT-ejon: <<http://nask-esperanto.org>>.

Esperanto-vojaĝoj tra Pollando

Antaŭ la UK okazos kaj la ĉiam ĉarma **ILEI-konferenco en Krakovo (17–24 Julio)** kaj samtempe la **Internacia Esperanto Konferenco en Bydgoszcz (18–25 Julio)** kun pluraj busekskursoj tra centra kaj norda Pollando kie loĝis L.L.Z. dum lastaj vivjaroj. Inkluzivas tranokton en Varsovio, viziton al la urbo kaj tombo de Zamenhof.

Poste per buso al la UK, survoje al Bjalistoko okazos kortuŝa vizito al Treblinka, kie pereis familianoj de Zamenhof dum la dua mondmilito.

94-a Universala Kongreso

Bjalistoko—25 Julio–1 Aŭgusto

En la naskiĝurbo de kreinto Ludoviko L. ZAMENHOF. Tre specialaj aranĝoj por celebri lian naskiĝon antaŭ 150 jaroj. Aliĝiloj por la UK kaj detaloj de eblaj ekskursoj, specialaj flugoj, kaj hotelo por la Universala Kongreso haveblas de:

Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue

Berkeley CA 94709

Tel.: 510-531-8393

<LusiHarmon@AOL.com>

La retejo de Don HARLOW

De Tim WESTOVER

Dum Januaro de la jaro 2008 forpasis du grandaj Esperanto pioniroj: Claude PIRON kaj Don Harlow. La unua estas konata, inter alia, pro siaj originalaj verkoj, kiuj ofte celas komencantojn—*Gerda Malaperis, Ili Kaptas Elzan, Vere aŭ Fantazie*. Sed ne malpli konataj al multaj komencantoj kaj spertuloj—ne nur usonaj—estas la nomo de Don Harlow. Kaj se ne la nomo, almenaŭ la retpaĝo de Don estas jam fama.

La heredaĵo de Don estas pli ampleksa, ol la retpaĝo, sed mi limigos min priskribi nur ĝin, ĉar aliaj pli kompetentas pri aliaj facetoj de lia vivo kaj agado. Kiam mi estis freŝbakita Esperantisto, mi entuziasmis pri literaturo. Sed mi ankoraŭ ne kuraĝis mendi kaj legi tutan libron. Mi entajpis “Esperanto literaturo” en mian retserĉilon, esperante trovi ion mallongan, kiun mi povus per vortaro kaj lernolibro trabori. Aperis la retejo “Literaturo en Esperanto” de Don Harlow, kaj ĝi estis frandaĵo pli granda, ol mi iam povis esperi.

Mi trovis poemojn de nomoj al mi jam iomete konataj, kiel Kalocsay kaj Auld. Mi trovis prozaĵojn de verkistoj kiuj verkis mirinde flue sed per malfacilaj vortoj, kiel Camacho. Mi trovis tradukaĵojn de verkoj, kiuj saltigas la koron de literatur-amanto—Yeates, Poe, Lewis Carroll, Shakespeare. Suprizis min la abundo de Esperanto literaturo—de preskaŭ ĉiu jardeko ekde la kreado de Esperanto estis io frandinda, kaj mi komencis vidi evoluon de Esperanto literaturo. Amasoj de fremdosonaj nomoj pruvis al mi, ke Esperanto literaturo estas ne nur propraĵo de malgranda grupo, sed tiom bunta, kiom promesas ĉiu Esperanto lernolibro.

Ĝus elirinte el amaso de “leono estas besto” kaj “la kafo estas bongusta” frazoj, mi trovis



la poemon “La Sonoriloj” de Poe, en la traduko de Kalocsay, per la retejo de Don Harlow. Kalocsay sukcesis kapti la sonon kaj ritmon de la originala poemo. Don mem deklamis la poemon, kaj ankaŭ li kaptis tiun sorĉan ritmon. Mi legis kaj frandis centojn da verkoj per la retejo de Don, sed sufiĉis tiu tradukado kaj deklamado de “La Sonoriloj” por pruvi kapablojn de Esperanto. La tuta retejo de Don por mi estis la pravigo de Esperanto—ĝis ne estas teoria, filozofia lingvo-projekto, sed vivanta lingvo, en kiu jam multege da homoj trovis rimedojn esprimi sin.

Unu el la kategorioj en la retejo de Don Harlow estas “Eventuala Enhavo de la Usona Antologio.” Tie oni trovas plurajn tradukojn de usonaj aŭtoroj—Twain, Poe, Longfellow, O. Henry, kaj aliaj. Plurajn tradukojn faras

Don mem. Bedaŭrinde, tiu koncepto de la Usona Antologio verŝajne neniam realiĝos. Sed mi kredas, ke Don Harlow fakte sukcesis krei Usonian Antologion, kaj tiu antologio estas lia retejo mem. Samkiel Usono—samkiel Esperantujo—la retejo de Don Harlow estas fandujo de diversaj lingvoj, spertoj, tradicioj, epokoj, kaj ideoj. Samkiel Usono—samkiel Esperantujo—la retejo estas loko de buntaj mirindaĵoj. Ĝi estas esplorinda loko kiu riĉe rekompensas esploristojn. Nepre esploru la retejon, kaj nepre frandu ĉion, kion Don kolektis por ni.

Ed WILLIGER kaj Tim nun laboras por transloki ĉion el la retpaĝoj de la familio Harlow, kion Don enmetis. Iam baldaŭ en 2009 vi povos ĝui la novan “Bibliotekon Don Harlow”, ĉe:

<<http://literaturo.org>>

VIRGULINO, BENU ĈI TIUN KANTONON

Kristalino

Virgulino Maria

Grac-plena Patrino

Patrino de forto kaj kompato.

Ankaŭ Vi perdis Filon

Vian Fileton

Vian Animon kaj Koron.

Tri krucoj sur la monteto

Tri kugletaĵoj resonantaj tra nia kantonon

Estas similaj scenaroj.

Fratoj mortigante fratojn,

Filoj mortigante filojn

Rompante patrin-korojn.

Ho, Virgulino Maria!

Kiel ni povas komprenigi la sekvan generacion

Ke ne necesas mortigi aliajn homojn por esti homo?

VIRGEN BENDICE ESTE BARRIO

Crystal Hoshiko Loutzenhiser CARDENAS

Virgen Maria

Mother of grace

Mother of strength and compassion.

You too lost your hijo

Your m'jito

Your alma and corazón.

Three crosses on the hill

Two gunshots echoing through our barrio

It's the same scenario.

Brothers killing brothers,

Sons killing sons

Leaving mothers to carry on.

¡Ay, Virgen Maria!

How can we make the next generation understand

That they don't have to kill other men to be man?

57-a Landa Kongreso Sankta Luiso • 57th National Congress St. Louis



RENKONTU MIN EN SANKTA-LUIISO

Jes, renkontu min kaj multajn aliajn Esperantistojn en Sankta-Luiso por la venonta landa kongreso de Esperanto-USA, kiu okazos de la 22-a ĝis la 25-a de Majo, 2009 (la tri-taga semajnfino por la Memoriga Tago).

La temo: **KIEL VARBI NOVAN GENERACION**

Boris Kolker, fama aŭtoro de la konata libro *Vojaĝo en Esperanto-lando*, membro de la Akademio de Esperanto, Honora Membro de la Universala Esperanto-Asocio, kaj libro-recenza redaktoro por *Monato* estos la speciala invitita gastoj por la kongreso. "Modernaj Rimedoj por Reteni Homojn en Esperantujo" estos la titolo de lia prelego ĉe la bankedo, kaj li ankaŭ prezentos prelegon pri siaj spertoj rilate al la verkado kaj aperigo de sia libro. Krome li estos ano de panelo kiu respondos al demandoj pri la lingvo kaj la nuntempa stato de la Esperanto-movado.


Estos informplenaj prelegoj, neformalaj kunvenoj, interesaj diskutoj, kaj kompreneble la kutimaj oficialaj aferoj kaj bankedo. Ni nun esploras la eblon de perkomputila ligo dum la kongreso kun Esperantistoj en Eŭropo kaj Brazilo pri la uzo de la novaj interretaj teknologioj por komuniki kaj varti Esperantistojn.

Nia bela hotelo, la *Sheraton Westport Lakeside Chateau*, estas la sama kie okazis la landa kongreso en 1999. Limuzinoj de la Flughaveno estas senpagaĵaj kaj la kosto de la ĉambroj estas tre modera. Dum Majo la vetero kutime estas bela. Estos ekskursoj al la fama Arkego, al la mondkonata Botanika Ĝardeno, al la bestoĝardeno, kaj/ aŭ al la art-muzeo.

Do venu. Renkontu min kaj multajn geamnikojn en Sankta-Luiso.

(Julian Hernandez, kiun ni antaŭe volis inviti al la kongreso, ne povos partopreni. Ni decidis ke li ne povos sufiĉe baldaŭ akiri vizon. La sistemo por akiri vizon por Kubano estas tre malrapida kaj malfidinda.)

Pli da detaloj pri la kongreso estos haveblaj ĉe <<http://esperanto-usa.org>> kaj en *Usono Esperantisto*.



pli ĉi npuol



Studu Esperanton en sunplena sud-Kalifornio!



NASK 40-a jaro!

Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

29 Junio-17 Julio 2009

Universitato de Kalifornio ĉe San-Diego, Usono ➡ UCSD


- ★ belega marborda etoso ĉe mondfama universitato
- ★ tri semajnoj en Esperantujo
- ★ kursoj por komencintoj, progresantoj kaj progresintoj
- ★ kvin oficialaj kreditoj, uzebaj por diploma studprogramo
- ★ instruistoj kaj lernantoj de ĉirkaŭ la mondo
- ★ vesperaj/semajnfinaj programoj: ludoj, ekskursoj, muziko...
- ★ propra dormĉambro kaj tri manĝoj ĉiutage
- ★ rabato por frua registriĝo

Plia informo: <http://esperanto.org/nask>

Aŭ kontaktu NASK-kunordiganton Ellen Eddy,

11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, Usono (USA)

(360) 754-4563 • EddyEllen@aol.com



pli ĉi npuol



In order to respect our members' privacy, the address list appears only in the print version of the newsletter.

Kiel kutime, ni lotumos unu premion inter la solvintoj: \$10 da rabato ĉe la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. **Via solvo alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ la 25-a de Januaro. Bonan solvodon!**

Horizontale

- 1 Plej grava gravul'
- 4 Esti kontentiga
- 9 Landkart'
- 12 Aparato, instru-mento, maŝino
- 13 Ĝi estas pli longa ol novel'
- 14 Eventualaj'
- 15 Unua parto de la proverbo
- 18 Nefakula; nek-lerika
- 19 Marbird'
- 20 Loĝant' de Malmö
- 23 Laŭ multaj, la lasta tag' de la semajno
- 27 Okulo-stimulo
- 30 (Mal)suprenlevil'
- 32 Pronomo palindroma
- 33 Preno de io kiel rimedo; kun *am-*, ĝi fariĝas ridiga
- 34 Kreskaĵo kun bulbo kaj grandaj bonodoraj floroj

Vertikale

- 35 "Por pendigi ŝteliston, antaŭe ___ kaptu."
- 36 "Spiko malplena plej alte ___ tenas."
- 37 Organ', kiun perdis van Gogh
- 38 "Esperis ___on, ricevis baton."
- 39 Montr'
- 41 Surpriziĝi; kun *ad-*, esti ravita
- 43 Akvoŝprucig'
- 45 Vazet' por trempoj plumojn
- 49 Dua parto de la proverbo
- 54 Grupo
- 55 "___(x2), brile brula / En arbaro nokt-obskura..." —Blake
- 56 "Aprila vetero— trompa ___o."
- 57 Bild' farita ĥemie, aŭ nun pli ofte, elektronike
- 58 Narkotikaĵoj faritaj el papavoj
- 59 Titolo de ĝentileco por kuracisto (mallongigo)

Vertikale

- 1 "Kiu rigardas ___on, maltrafas sian celon."
- 2 E-USA, pasintece
- 3 Kavigi la teron
- 4 Patropatropatr'
- 5 "Kiu bone sidas, tiu ___on ne ŝanĝu."
- 6 Forta (kaj ofte emocia) inklinado al persono aŭ ideo
- 7 "Ĉie estas varme, sed hejme plej ___e."
- 8 Poststomaka organo; metoda provo ne por viroj?
- 9 Brulebla ŝnur'
- 10 Pingloarb'; kun *r-*, ĝi fariĝas infekta, mordemiga mal-san'
- 11 Adverbo kiu montras daŭradon
- 16 Litero neesperanta
- 17 "Li ĵus elrampis el la ___ ŝelo."
- 21 Moviĝ' eksteren; dua lib' de la Malnova Testamento
- 22 Malfacile decidebla situaci'
- 24 Kun 27 vertikale, Harmon-a paro
- 25 "Por unu, festeno; por ___ , ĉagreno."
- 26 Frapsonet' de io metala aŭ vitra
- 27 Vidu 24 vertikale
- 28 Fabrikej', ofte por prilabori metalon
- 29 Terglob'
- 31 Subfirma'; kun *-n*, ĝi fariĝas id' malvira

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11
12				13						14		
15			16						17			
18							19					
			20		21	22		23		24	25	26
27	28	29			30		31			32		
33				34						35		
36				37					38			
39			40			41		42				
			43		44			45		46	47	48
49	50	51				52	53					
54				55						56		
57				58						59		

Solvo de la enigmo en numero 2008/5

H	M	M		K	A	S	H	I		A	H	H
O	N	I		A	M	P	O	L		D	U	A
K	O	N	S	T	E	R	N	O	J			F
	P	H		R	O	T		H				
		A		I	N	A		O		G		
	D	K		K	I	S		N	E	R	V	
H	O	N	T					G	L	U	I	
U	N	U	A		R	I	T		L	O		
	I		B		I	D	E		I			
		U		C	I	R	S			I		
	A		L	A	H	O	M	E	T	O	D	O
E	C	H		L	U	T	O	J		R	A	N
C	H	E		K	L	A	S	O		O	R	D

Gajnis la lastan lotumadon **E. James LIEBERMAN**. Korajn gratulojn al ankaŭ ĉiuj niaj aliaj ludintoj: Ellen EDDY, Keneĉjo GOLDBERGO, Lucas GRAVES, Bill HARMON, Arlyn KERR kaj Peter MCCORQUODALE.


- 34 Ĝi parencas al biblia plagbes-teto
- 38 "___ bona, ĉio bona."
- 40 Pensaj'
- 42 Lokoj kie foje difektiĝas ŝipoj
- 44 Mallonga, dika pec' da ligno
- 46 Stangar' kiu funkcias kiel barilo
- 47 Hejm' por fetoj
- 48 "De zorgoj, ne de ___j, blankiĝas la haroj."
- 49 Bruna trinkaj, kutime kafein-hava
- 50 Flava ringmetalo
- 51 "Kiu ludas kun ___o, malpurigas la manojn."
- 52 "Pli facile estas regi ol ___."
- 53 Titolo de ĝentileco por viro (mallongigo)



Dankon denove al Rex MAY. Vizitu lian retejon ĉe <<http://balocartoons.com>>.

Remember: your membership ends on the date specified in the first line of the address listed above. Don't forget to renew!

New from the Book Service



PASPORTA SERVO 2008

The latest edition of the annual catalog of hosts in the network for global travelers. 1225 addresses in 90 countries. A necessity for the Esperanto-speaking globetrotter. 2008. 179 p. 155x110.

Paper. The Netherlands.

\$28.25



ILUSTRITA OFICIALA RADIKARO POR LERNANTOJ

Luiz PORTELLA (Ed.)

Based on the Baza Radikaro Oficiala of the Academy of Esperanto. Includes definitions or explanations of 2,656 words, with

approximately 520 illustrations. The definitions are simple and contain only roots that are defined in the book itself. Each definition includes a number from 1 to 9, indicating how often the word is used in general Esperanto speech and writing. The book is pocket-size, great for learning 5 new words every day or for looking up words while reading an Esperanto magazine in the doctor's office. 2008. 98p. 150x105. Paper. Brazil. ISBN 978-85-60661-05-3.

\$6.70



LA DORMANTO VEKIĜAS

H.G. WELLS

A novel about a man who sleeps for two hundred and three years, waking up in a completely transformed London, where, because of compound

interest on his bank accounts, he has become the richest man in the world. A fanatic socialist and author of prophetic writings, the main character awakes to see his dreams realized, and the future revealed to him in all its horrors and deformities. 2008. 214p. 210x145. Paper. Rotterdam.

\$21.00



LA PATRO

Joe BAZILIO

A film version of a story originally from Japanese literature of the early twentieth century. A real-life drama about the emotional life of the Negromonte family. Directed and produced

by the same group that made *Gerda mala-peris!* Unlike Gerda, however, the language is not at a beginner's level. Approximately 40 minutes. 2007. DVD.

\$22.50



KOMPUTEKO

Yves NEVELSTEEN (Ed.)

English-Esperanto Computer Dictionary. As of now (2008) this is the definitive dictionary of computer terms in Esperanto. Based on the dictionaries of Pokrovskij (Kompleks),

OpenOffice, TekVort, Maŭro (akademiano), Reta Vortaro, KDE, PIV, Lode, Drupalo, KompList, FEL, Vikipedio, Firefox and KompBaz. Recommended by Bertilo WENNERGREN (PMEG) and Paul PEERAERTS (Monato). 2008. 94p. 205x147. Paper. Slovakia.

\$14.00

All books listed can be ordered: by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; by telephone at (510) 653-0998; by fax from (510) 653-1468; or through our website at <<http://esperanto-usa.org>>. For phone, fax or website orders, be sure to include a credit-card number. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged when the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar versus other currencies, all prices are subject to change without notice.